



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 9-a de Marto 2021

(zom-kunveno)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.
Gasto: Jinon Meiri.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

- a) **Amri:** vendrede mi finis plian sesion de *Nicocot*, du eksterlandaj gastinoj alparolis la gelernantojn. Estis impresiga prezentado.
- b) Instruado de Esperanto – sed mankas instruisto! **Mikaelo:** ĉu eble mi instruus al ruslingvanoj? Cxu eble en Septembro?
- c) **Jehoŝua:** indas daŭrigi la serĉadon de loko – sed ne (nur) por oficejo, kie ni ne sukcesis ĝis nun, sed por magazeno! La sanstato de Jinon ne estas certa – ne eblas do garantii, ke lia domo servos nin por ni. Ĝi povus esti malpli kosta, malpli centra.
- ĉ) **Amri:** baldaŭ okazos scienca forumo – detaloj aperos en la revuo *Esperanto*.

2. Dratverejo

- a) **Ŝlomo:** lastatempe ne estis kontakto kun la loĝantoj. **Gabi:** Ludmila (la patrino) promesis pagi la 12-an de Marto. **Jehoŝua:** Marina kaj Ludmila proprainiciate rekalkis la loĝejon; Ludmila plendis, ke post la riparo de la akvotubo, la asekur-kompanio ne reinstalis la lavabon en la banĉambro.
- b) **Jehoŝua:** eble la luanto Dima jam ne revenos al la loĝejo – sed la kontrakto ja inkluzivas lin, kaj ni eventuale devos reformuli la kontrakton nur je ŝia nomo – ŝi bezonus ĝin por prezenti al la *Bituah Leumi* aŭ al la Ministerio pri Loĝigo por ricevi subvencion.

3. Israela Kongreso

Amri: nia supozo praviĝis: ne indas organizi la Kongreson en Aprilo, ĉar ne povos veni eksterlandaj gastoj; la trajnoj daŭre ne haltas en la flughaveno. Ni provu fari IK-on en Oktobro (sufiĉos unu monato antaŭ la evento por organizi) kaj en 2022 – denove en Aprilo.

La venonta kunsido: la 6-an de Aprilo 2021 (post la Pasko), je la 20h00 (*zome*)

Protokolis: Gabi Zeevi